

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2019. №12



Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2019. №12 (302)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas nur elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiusezone. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Paweł Fischer-Kotowski (vicredaktoro), Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Povilas Jegorovas, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajevo, Sergio Pokrovskij

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adreso: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

Retejoj: <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

Abontarifo por 2020

Abonantoj: 15 eŭroj, 17 usonaj dolaroj, 60 zlotoj, 850 rubloj

Amikoj: 30 eŭroj, 33 usonaj dolaroj, 120 zlotoj, 1700 rubloj

Patronoj: 100 eŭroj, 110 usonaj dolaroj, 400 zlotoj, 5500 rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represo: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2019, №12 (302).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 30 декабря 2019 г.

© La Ondo de Esperanto, 2019

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3
Redakcie	5
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Anstataŭ epitafo.....	6
Temo	7
Paweł Fischer-Kotowski. Anna Löwenstein: la Esperantisto de la Jaro 2019	8
Paweł Fischer-Kotowski. Anna Löwenstein: “Mi ne helpas komencantojn, mi helpas UEA”: Intervjuo kun Anna Löwenstein.....	9
Elektokomisiono de la Esperantisto de la Jaro 2019.....	13
Eventoj	14
Elżbieta Karczewska. Zamenhofaj Tagoj en la naskiĝurbo de Ludoviko	15
Povilas Jegorovas. Du datrevenoj en Litovio.....	18
Ronald Schindler. Zamenhoffesto 2019 en Berlino.....	21
Lu Wunsch-Rolshoven. Zamenhofa Matenmanĝo en Berlino.....	22
Irina Gonĉarova. La 14a Lingva Festivalo en la ĉefurbo de Ruslando	24
Patricia Gobert. Studosemajnfino: Lude kaj serioze, sed antaŭ ĉio parole.....	26
Ruben Sanchez. La 60a kongreso en Argentino.....	27
Said Baluĉi. La 51a Malferma Tago en Roterdamo.....	28
Intensa Esperanto-preparkurso por la Montreala UK.....	29
Kultura Tago: Faktoj kaj fantazioj.....	30
Riichi Karibe – la nova konsulo de la Esperanta Civito.....	31
Mila van der Horst-Kolińska forpasis	31
Koncize (11 informoj)	32
Tribuno	33
Niaj atingoj kaj malsukcesoj en 2019 (Peter Baláž, Anna Löwenstein, Renato Corsetti, Albert Stalin T. Garrido, Dennis Keefe, Francesco Maurelli, Zhang Ping, Vinko Markovo, Giorgio Silfer, Trezoro Huang Yinbao).....	34
Peter Baláž. E@I: Eventoj kaj agado por 2020	40
UEA invitas IKU-prelegantojn.....	42
Janusz Sulżycki. <i>La Ondo</i> : abundeco da informoj kaj belegaj fotoj.....	42
Malcolm Jones. Grava, serioza, leginda revuo	43
Nia respondejo	43

Arkivo	44
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en januaro 2020	45
Kulturo	46
Paweł Fischer-Kotowski. Nemere: "Mi estas verkisto, tio estas unika metio": Intervjuo kun István Nemere	47
Halina Gorecka. Litova eldono de la biografia skizo pri Zamenhof.....	49
Paweł Fischer-Kotowski. BLK: ree havebla, nemalhavebla (Recenzo: <i>Baza literatura krestomatio</i>)	51
Paŭlo Moĵajevo. Mezqualita omaĝo al elstara artisto (Recenzo: <i>La Kompanoj. Brel en Esperanto</i>)	52
Andrej Peĉênkin. Ĉu nova estonto por <i>Unesko-Kuriero</i> ?	54
<i>Literatura Foiro</i> , 2019, №302	55
Valentin Melnikov. "Kunigas landojn Balta maro..."	56
Ricevitaj gazetoj	56
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Bibliografio de Halina Gorecka (2)	57
Mozaiko	74
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj.....	75

Al ĉiuj abonantoj, aŭtoroj, redakcianoj, perantoj kaj al ni mem ni deziras Gajan Kristnaskon kaj bonan jaron 2020an! (Kovropaĝa bildo de Vadym Cherenko, Depositphotos_268600024_xl-2015.jpg)

Ni en la reto:

La Ondo de Esperanto: <http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm>

Abono 2019: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Elŝuteblaj libroj: <http://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php>

Novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Radio Esperanto: <http://radio.esperanto-ondo.ru/>

Halina en FB: <https://www.facebook.com/halina.gorecka.3>

Aleksander en LJ (ruse): <http://sezonoj.livejournal.com/>

Ruslingva informretejo: <http://rusa.esperanto-ondo.ru/>

Redakcie



Ĉi tiu numero de *La Ondo de Esperanto*, estas la lasta en la longa serio de ĉiumonata aper-ritmo. Tamen ni diras ne “Adiaŭ!”, sed “Ĝis revido”. Ĝis revido en la venonta jaro! Legu pli en la sekva paĝo.

(Fotis Gražvydas Jurgelevičius la 14an de decembro en Kaŭno)

Anstataŭ epitafo

La decido pri la baldaŭa ĉeso de *La Ondo de Esperanto*, publike anoncita la 21an de septembro en la festivalo ARKONES kaj publikigita en la jubilea *Ondo*, kaŭzis lavangon da reagoj buŝaj kaj skribaj. Ĉiuj reagintoj (krom anonimulo en *Heroldo Komunikas*) esprimas sian bedaŭron pro la ĉeso, kaj plejparto komprenas la kaŭzon de la ĉeso kaj sendas san- kaj bondezirojn, kiujn ni dankas kaj recipokas.

Sed neniu pretas preni sur sin la respondecon pri *La Ondo*, kiu inkluzivas multe da laboro kaj malmulte da enspezo. Do, konsultinte plurajn personojn, ni kun bedaŭro devas rekonfirmi nian decidon. La decembra *Ondo*, kiun vi nun legas, estas la lasta ero en la longa serio de ĉiumonata aper-ritmo.

Ekde januaro ni publikigos Esperantajn novaĵojn en nia novaĵ-retejo, kies nomo ŝanĝiĝos: *La Balta Ondo* iĝos *La Ondo de Esperanto*. Jam ĉi-vintre modernigiĝos ĝia aspekto, aperos novaj rubrikoj, estos invititaj pliaj kunlaborantoj.

Ni strebos aperigi almenaŭ unu informon ĉiutage, escepte de la periodoj, kiujn ni pasigos eksterhejme. Tiu laboro estos malpli streĉa ol la laboro pri ĉiumonata gazeto, kaj la redaktoro ne plu devos sidi ĉe la komputilo ĉiutage ekde la 9a matene ĝis la 3a nokte dum la redakta semajno. Ni intencas redukti la labortagon al nur ok horoj, el kiuj du-tri estos dediĉataj al la retejo.

Kaj nun venas novaĵo.

Ĉiusezone la plej interesaj tekstoj el la retejo, inkluzive de ĉiuj recenzoj kaj intervjuoj, aperos kiel almanako 120-150-paĝa (laŭ la normoj “pdf” laŭ “ePub”), kiu krome enhavos artikolojn, eseojn kaj beletraĵojn, verkitaĵojn speciale por la almanako, kiu konservos la nomon *La Ondo de Esperanto*.

La printempa almanako aperos fine de marto, la somera fine de junio, la aŭtuna en septembro, kaj la vintra je Kristnasko.

Malkiel la retejo, kiu plu estos libere legebla de ĉiu deziranto, la almanakon ricevos nur tiuj, kiuj abonos ĝin. Estas tri abonkategorioj:

1. Abonanto – 15 eŭroj; 2. Amiko – 30 eŭroj; 3. Patrono – 100 eŭroj.

La pagoj estos akceptataj ĉe nia UEA-konto kaj per la pagosistemo PayPal. La pagomanieroj baldaŭ aperos en nia retejo. La nomoj de ĉiuj amikoj kaj patronoj aperos en la retejo kaj en la almanako (krom tiuj, kiuj preferas resti anonimaj).

Ĉiu patrono ricevos diplomon de la redakcio, senpagan bitversion de ĉiu nova libro de *Sezonoj* kaj 50-procentan rabaton por ĉiu nova papera libro.

Se la mono, ricevota en 2020, kovros niajn bazajn kostojn (250 eŭroj monate, aŭ tri mil eŭroj jare), ni daŭrigos la novan sistemon por pliaj du jaroj kaj fine de la trijara periodo pripensos la daŭrigendon kaj daŭrigeblon de la projekto.

Bonan jaron 2020!

**Halina Gorecka
Aleksander Korĵenkov**

Temo



Ni sendas niajn korajn gratulojn kaj bondezirojn al Anna Löwenstein, elektita kiel la Esperantisto de la Jaro 2019!

Anna Löwenstein: la Esperantisto de la Jaro 2019

La Ondo de Esperanto en 1998 iniciatis ĉiujaran proklamadon de la Esperantisto de la Jaro. Al ĉi tiu projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj.

Kiel la unua laŭreato en 1998 estis elektita William Auld. En 1999 lin sekvis Keppel Enderby. En 2000 estis distingitaj tri personoj: Hans Bakker, Mauro La Torre kaj Jouko Lindstedt. Poste laŭreatiĝis Osmo Buller (2001), Michel Duc Goninaz (2002), Dafydd ab Iago (2003), Helmar Frank (2004), Povilas Jegorovas (2005), Bertilo Wennergren (2006), Peter Zilvar (2007), Ilona Koutny (2008), Aleksander Korĵenkov (2009), Katalin Kováts (2010), Dennis Keefe (2011), Peter Baláž (2012), Mark Fettes (2013), Mireille Grosjean (2014), Chuck Smith (2015), Stefan MacGill (2016), Trezoro Huang Yinbao (2017) kaj Hori Jasuo (2018).

En 2019 la elektado de la Esperantisto de la Jaro okazis por la 22a fojo. Ĉi-jare 15 kandidatigantoj proponis 20 kandidatojn, al kiuj 15 elektantoj jene donis siajn voĉojn:

Anna Löwenstein – 8 voĉoj
Barbara Pietrzak – 6 voĉoj
Bernhard Tuidier – 5 voĉoj
Halina Gorecka – 4 voĉoj
Anna Striganova – 3 voĉoj

Du kandidatoj ricevis po du voĉojn, kvin kandidatoj ricevis po unu voĉon.

Anna Löwenstein, 68-jara brita verkistino, aŭtoro de originalaj romanoj kaj noveloj en Esperanto, estas elektita la Esperantisto de la Jaro 2019. En 2006 ŝi iniciatis la Movadan Foiron kadre de la 91a Universala Kongreso en Florenco kaj ekde tiam ŝi prizorgas ĝin en ĉiu UK. Fine de 2018 ŝi iniciatis kaj ekredaktis la retejon uea.facila.org, en kiu aperas informoj kaj novaĵoj pri UEA kaj la Esperantomovado. La artikoloj estas mallongaj kaj facilaj por helpi enmovadiĝon de tiuj, kiuj eklernis la lingvon per Duolingo kaj aliaj retaj kursoj.

***Gratulon al la Esperantisto de la Jaro 2019 Anna Löwenstein,
kiu estas la kvara virino ricevinta ĉi tiun honoran titolon!***

Paweł Fischer-Kotowski
sekretario



Anna Löwenstein: “Mi ne helpas komencantojn, mi helpas UEA”

Ekde pluraj jaroj vi dediĉas multan tempon kaj energion al komencantoj kaj lernantoj. Jam antaŭ kvardeko da jaroj vi kreis liston de “facilaj vortoj” por *Kontakto* kaj ekredaktis la rubrikon, en kiu aperis artikol(et)oj facile kompreneblaj eĉ por la komencantoj. Poste vi daŭrigis en tiu kampo, nun ekde unu jaro vi redaktas la retejon uea.facila. Kial vi opinias ke tio gravas?

Mi decidis krei retejon por novaj esperantistoj ne por helpi komencantojn sed por helpi UEA. Mi sciis, ke la membronombroj daŭre falas, ĝis tia grado ke la eĉa travivo de UEA estas ne plu certa. Sed kiel UEA povas esperi logi novulojn? La revuo estas tro malfacila por ili, kaj ĝi ne ofertas ion alian, kiu povus interesi nesperantan esperantiston. Tial mia celo estis prezenti al novaj esperantistoj similspican enhavon kiel la revuo *Esperanto*, kun novaĵoj pri la agadoj de UEA, informoj pri la Esperanto-movado, librorecenzoj, anoncoj kaj raportoj pri kongresoj, kaj simile. Tiel mi esperas, ke lernantoj komencos pli bone koni UEA, kaj kompreni kial ĝia pluvivado gravas por la Esperanto-movado. Tio necesas, antaŭ ol ili decidus pagi ne malgrandan kotizon por membriĝi en la asocio.

Laŭ iuj vi ne nur helpas komencantojn, sed ŝatus entute kripligi Esperanton per simpligo. Vi mem antaŭ dek jaroj deklaris: “Poetoj detruas nian lingvon!” En la fama artikolo en la revuo *Esperanto* vi klarigis ke la literaturistoj portas en Esperanton amason da neutilaj vortoj kiuj malfaciligas la lingvon. Ĉu io ŝanĝiĝis en via opinio?

Ĉu io ŝanĝiĝis en mia opinio? Simpla respondo: Ne.

Mi aldonu, ke mi ne atendis, ke tiu artikolo vekos tiom da ekscito. La homoj ankoraŭ nun citas ĝian titolon. Evidente mi tuŝis nervon.

Ĝi estas demonstra versio de la 76-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Eventoj

2019 decembro 10

* tago de homaj rajtoj



* lingvaj rajtoj estas homaj rajtoj



UNIVERSALA
ESPERANTO-ASOCIO

الْحَقُوقُ اللِّغْوِيَّةُ ЯЗЫКОВЫЕ ПРАВА
DERECHOS LINGÜÍSTICOS
DROITS LINGUISTIQUES
语言权 LINGUISTIC RIGHTS



decembro 15

ESPERANTO
Zamenhof-tago
Esperanta Libro-tago



ESPERANTO - la lingvo internacia

En decembro esperantistoj tra la tuta mondo diversmaniere festis la Zamenhofan Tagon, kiu estas ankaŭ la Tago de la Esperanta Libro. Legu pri kelkaj el la festoj en la sekvaj paĝoj.



Foto: Andrzej Sochacki

Zamenhofaj Tagoj en la naskiĝurbo de Ludoviko

“En Bjalistoko vivas ni alie”, – kantis sur la scenejo nia junularo dum la 94a UK. “Alie – do: kiamaniere?” – demandas esperantistoj, kiuj venas por partopreni niajn eventojn. En la naskiĝurbo de la Majstro tri organizaĵoj unuiĝas, okazigante Esperantajn aranĝojn: Centro Ludoviko Zamenhof, Bjalistoka Esperanto-Societo (BES) kaj Podlaĥia Libraro Łukasz Górnicki (fakte ĝia filio №14 “Esperanto-Libraro”).

Centro Ludoviko Zamenhof, kreita en la jaro 2009, disponigas al ni salonojn, pretigas ekspoziciojn, garantias fakan priservon dum prelegoj kaj koncertoj. BES invitas interesajn homojn: prelegantojn landajn kaj eksterlandajn, partoprenantojn... kaj zorgas pri la programo. “Esperanto-Libraro” instigas homojn legi en Esperanto. La biblioteko ankaŭ invitas ĉiujn verki kaj partopreni la ĉiujaran literaturan konkurson. Ĉi-foje nia aldona partnero estis Instituto de Pola Kulturo en Londono.

La jaro 2019 estas pluroble datrevena por nia urbo: antaŭ 160 jaroj naskiĝis tie ĉi Ludoviko Lazaro Zamenhof, antaŭ 100 jaroj en Bjalistoko aperis la Zamenhofa strato, antaŭ 10 jaroj en la ĉefurbo de Podlaĥia regiono okazis la 94a UK.

Niaj gastoj estas kontentaj, ke en la programo oni ne havas samtempe diversajn proponojn. Sole dum la romkatolika diservo la organizantoj proponas gvidatan promenadon tra la urbo. Neniu travivas streson, ne sciante kion elekti, neniu devas bedaŭri sian elekton aŭskultante rakontojn de la aliaj.

Centro Ludoviko Zamenhof reeldonis la Unuan Libron, kies aŭtoro estis Ludoviko mem. Ĝi estos akirebla en la akceptejo por ĉiuj vizitantoj.

Kiel la prologo al la 20aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj estis prezento, kiu okazis jam la 12an de decembro en Galerio Slendziński. Temis pri la bjalistoka Esperanto-movado en la intermilita tempo titolita “Poloj, judoj – kune”; Przemek Wierzbowski rakontis kaj la historiisto Tomek Wiśniewski montris bildojn el sia ege riĉa kolekto, kiuj atestis, ke por la Esperanto-movado nacieco ne estis grava.

La festo mem komenciĝis la 13an de decembro per malfermo de du portempaj ekspozicioj en Centro Ludoviko Zamenhof. Pere de Instituto de Pola Kulturo en Londono atingis nin donaco de la brita esperantisto Bill Chapman: kolekto de la vitraj platetoj montrantaj la 8an UK en Krakovo. Danke al zorgoj de fakuloj el la Centro, la 107-jaraĝajn platetojn kaj iliajn grandformatajn bildojn oni prezentis al la ĉeestantoj. Pri la tiama UK rakontis Roman Dobrzyński.

Ĉu vi scias, ke en Bjalistoko estas 24 ZEOj? Probable Bjalistoko estas unusola urbo en la mondo, en kiu troviĝas du monumentoj al Ludoviko Zamenhof. La artfotisto Jerzy Barańczuk vizitis lokojn ligitajn kun Esperanto kun sia fotilo, kreante poste sur la muro de la salono albumon dignan por Zamenhof kaj ties verko.

Post la morto de Ludoviko danke al streboj de esperantistoj oni ŝanĝis la nomon de la strato Verda, ĉe kiu Ludoviko loĝis dum 14 jaroj, al Zamenhof. Pri la historio de la strato Zamenhof prelegis la loka historiisto Wiesław Wróbel. Nina Pietuchowska trovis en la urba arkivo multajn informojn pri homoj naskitaj en Bjalistoko, konataj en la mondo, sed nekonataj surloke, kaj havis la okazon prezenti ilin al niaj gastoj.

En la literatura salono Tomek Chmielik kaj Mikaelo Bronŝtejn prezentis novajn eldonaĵojn jam atingeblajn en nia loka librovendejeto. La koro doloras, kiam iu forĵetas malnovajn librojn, kaj pro tio pli ol cent bibliotekaj duoblaĵoj el la “Esperanto-Libraro” trovis novajn posedantojn en la brokantejo kontraŭ simbola 1 zloto.

Inter la delegitoj, kiuj venis por feste meti florojn ĉe la malnova monumento al Zamenhof, sur la fono de la flirtantaj flagoj de EU, Pollando kaj Esperanto, estis reprezentantoj de la Podlaŝia Marŝalo, venis la vicurbestro pri kulturo de Bjalistoko, reprezentantoj de kulturaj institucioj, lernejoj, kaj de BES. Kun la “malgranda Ludoviko” ni faris komunan foton.

El la Hela Monto en Częstochowa venis la pastro Roman Gmyrek por celebri en belega baroka preĝejo meson por la paco en la mondo. Jam de 20 jaroj ĉiam dum la Esperanta diservo kantas por ni en Esperanto membroj de la koruso *Belkanto*.

Muzikaj koncertoj ravis esperantistojn kaj loĝantojn de la urbo, kiuj ĉeestis la aranĝon. En la Jaro de Moniuszko la publiko aplaudis la tenoron de la Varsovia operejo Felikson Gałeczki, kantantan Esperante ariojn el la opero *Halka* kaj aliajn famajn kantojn de Moniuszko. La blinda kantisto Karsten Schnathorst koncertis en Esperanto, sed la korojn de la aŭskultantoj li konkeris per sia infana alrido kaj mondkonataj kantoj. Kune kun li prezentis sin sur la scenejo, legante siajn poemetojn, la poetino Halina Kuropatnicka Salamon. Mikaelo Bronŝtejn prezentis la koncerton

“Kirlanta sorto” kun siaj propraj kantoj, verkoj de Mordeĥaj Gebirtig kaj de aliaj konataj kantistoj.

Infanoj sur la scenejo ĉiam vekas inter plenkreskuloj pozitivajn emociojn. Lech Mazurek gvidas la ensemblon *Uku-Donaco Bjalistoko*, kiu plenumas kantojn de Gebirtig en Esperanto, en la pola kaj en la jida. Ĉiujare dum la koncerto ili mirigas nin per novaĵoj en sia repertuaro.

Bedaŭru, se vi ĝis nun ne aŭdis la dolĉan voĉon de Kasia Breczko en la ensemble *Frey-Lech Trio* kantantan Esperante klezmerajn kantojn. La violoneto ploras kune kun ŝi kaj la akordiono substrekas la ritmon...

La naskiĝtaga torto pezis 20 kilogramojn kaj malaperis dum unu horo, kio signalas, ke kiel kutime la festo en la Centro Ludoviko Zamenhof finiĝis, post kio ni kune translokiĝis por nokte diboĉi en la Esperanto-klubejo.

Bela koncerto okazis dum la tuttaga ekskurso al Tykocin – urbeto pli aĝa ol Bjalistoko. Tie ni estis gastoj de la malnova Granda Sinagogo. En ĝia bele renovigita ejo denove koncertis la infanoj kaj la plenkreskaj muzikistoj sub la gvido de Lech Mazurek. Okazis prezento de la nova libro *Adiaŭ, Krakovo!* de Mordeĥaj Gebirtig.

La 20aj Zamenhofaj Tagoj en Bjalistoko finiĝis la 16an de decembro en la Lingvo-Kafejo kun Mikaelo Bronŝtejn kaj lia gitaro. Komune ni skribis kaj sendis al la ĉielo poŝtkarton kun salutoj al Ludoviko. Bedaŭru, se sur ĝi mankas via subskribo...

Elźbieta Karczewska



Uku-Donaco Bjalistoko (Foto: Nina Pietuchowska)

Du datrevenoj en Litovio



Jam dum sesdek jaroj meze de decembro en Kaŭno okazas la tradiciaj Zamenhof-Tagoj. Ekde 1988 samtempe kaj samloke okazas ankaŭ jarkongresoj de Litova Esperanto-Asocio (LEA), refondita en 1988.

Ĉi-jare ambaŭ aranĝoj okazis la 14-15an de decembro kun entute 110 esperantistoj el 16 urboj de Litovio, tri gastoj el Latvio kaj du el Ruslando (Kaliningrado). La programo estis forte stampita de du gravaj datrevenoj – la 160a naskiĝdatreveno de Ludoviko Zamenhof kaj la 100a datreveno de la fondo de LEA.

La 55an kongreson de LEA komencis enkonduka parolado de ĝia prezidanto Povilas Jegorovas. Poste li skize prezentis la agadon de Litoviaj esperantistoj dum ĉi tiu jubilea jaro. La jaro estis sukcesa kaj rezultodona. La agado ĉefe evoluis laŭ jenaj kvar direktoj:

1. Organizado kaj efektivigo de la 55aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en Panevėžys.
2. Migrado de la Zamenhofa ekspozicio tra pliaj urboj de Litovio.
3. Diversaj aranĝoj lige kun la 100-jariĝo de LEA.
4. Diversaj aranĝoj lige kun la 160-jariĝo de Zamenhof.

Pri BET-55 jam estis publikigitaj multaj materialoj. Necesas nur substreki, ke ankaŭ BET, unuafoje okazinta en 1959, festis sian 60-jariĝon en Panevėžys kaj estis dediĉita al la 100-jariĝo de LEA. BET-55 estis rekorda kvante kaj kvalite. En Litovio aperis pli ol 30 artikoloj pri BET en tutlandaj amaskomunikiloj. Eksterlande pri ĝi aperis pli ol 20 publikaĵoj. Ankaŭ la interna informado estis tre intensa – en la retejo de BET-55 aperis pli ol 180 informoj. Ĉi-jare estis enkondukitaj kelkaj novaĵoj, ekzemple, la unuan fojon estis eldonita tre utila kaj enhavoriĉa *Libro por BET-ano*, estis organizita urbestra akcepto ne nur por invititoj, sed por ĉiuj partoprenantoj, en la programo de BET estis Sanmarineca Universitata Sesio (SUS) de AIS.

La 100-jariĝo de LEA estis menciita en pluraj publikaĵoj enlande kaj eksterlande. En Litoviaj tutlandaj amaskomunikiloj aperis pli ol 20 ampleksaj artikoloj pri la pasinta kaj nuna agadoj de LEA. Septembre en Veisiejai okazis speciala kunveno por soleni la asocian jubileon. Ampleksaj artikoloj kaj studoj pri ĝi aperis en *Almanako Lorenz 2019*, *Libro por BET-ano*, *La Ondo de Esperanto* kaj aliloke. Laste en la ĵus aperinta biografia skizo *Zamenhof* de Aleksander Korĵenkov supleme aperis du historiaj artikoloj de Vytautas Šilas kaj ĝenerala artikolo de Povilas Jegorovas.

La 160-jariĝo de Ludoviko Zamenhof estis digne menciita en Litovio. En Litoviaj tutlandaj amaskomunikiloj aperis pli ol 20 ampleksaj publikaĵoj pri la kreinto

de Esperanto kaj pri Esperanto en Litovio ĝenerale. Speciale por la jubileo LEA kunlabore kun Monda Centro de Litovoj eldonis la biografian skizon pri Ludoviko Zamenhof, verkitan de Aleksander Korĵenkov, en la litova lingvo. Ĝi estas la sepa libro pri Zamenhof, eldonita en la litova lingvo. Ankaŭ pri ĝi vaste informis amas-komunikiloj.

Parolante pri la informado pri Esperanto por neesperantista publiko necesas menciigi multajn publikaĵojn en nacilingvaj amaskomunikiloj okaze de ĉiuj gravaj eventoj kaj datrevenoj de la movado. Entute aperis pli ol cent diversaj publikaĵoj. Krome, okazis multaj mencioj en radio kaj televido. Litova naca televido preparis kaj oktobre disvidigis apartan duonhoran programon pri Esperanto en la ĉiusemajna elsendo *Daiktu istorijos*. LEA intense kunlaboras kun 15 gazetoj kaj novaĵretejoj de Litovio, kiuj regule informas pri esperantista agado en Litovio.

Internaciaj ligoj de Litoviaj esperantistoj estis intensaj. Pli ol 20 litovianoj partoprenis la 104an UK en Lahtio. La ensemblo *Asorti* koncertis tie. Oni partoprenis ankaŭ en multaj aliaj eksterlandaj Esperanto-aranĝoj. Tre bona kunlaboro daŭras kun esperantistoj de Kaliningrado.

Kunlabore kun LEA dum 2019 en Litovio estis eldonitaj kvin libroj: la Kaliningrada *Sezonoj* eldonis *Bazan Literaturan Krestomation*. Krome, aperis *Libro por BET-ano* kaj gvidlibreto pri Panevėžys. La Moskva *Impeto* aperigis libron de IKU kaj de SUS. Kaj jarfine aperis la jam menciita libro pri Zamenhof.

Okazis ĉiuj tradiciaj esperantistaj aranĝoj en Litovio inkluzive de la ĵurnalista seminario en Aukštadvaris.

Esperanto-instruado okazas en Vilno, Šiauliai, Mažeikiai.

El la kluba agado menciindas tiu en Panevėžys, Jurbarkas, Šiauliai.

Lernantoj en Vilno kreis dokumentan filmon pri Zamenhof kaj Veisiejai.

La interna informado estas tre bona. Ekde 1996 funkcias la retejo de LEA, ekde 2000 funkcias la dissendolisto de Litoviaj esperantistoj, ekde 2012 funkcias Facebook-grupo de LEA.

Fine de sia parolado la prezidanto de LEA enmanigis dankfoliojn al dudek Litovijaj esperantistoj, kiuj ĉi-jare havis aĝjubileojn. Dankfolioj estis enmanigitaj ankaŭ al Halina Gorecka el Kaliningrado pro la multjara efika kunlaboro kaj okaze de ŝia antaŭnelonga jubileo kaj al Aleksander Korĵenkov pro lia aktiva agado en la organiza komitato de BET-55.

Sekvis alparoloj de kelkaj partoprenintoj. Per tio la 55a kongreso de Litova Esperanto-Asocio finiĝis.

Post la tagmanĝo, senpaga por ĉiu partoprenanto, komenciĝis Zamenhof-Tagoj 2019.

Okaze de la centjariĝo de LEA Vytautas Šilas prelegis pri la temo "Homoj, kiuj kreis Litovan Esperanto-Asociation". Sekvis prezento de la libro *Zamenhofas: biografine apybraiža* de Aleksander Korĵenkov. Pri la libro parolis ĝia aŭtoro Aleksander Korĵenkov, la tradukinto al la litova lingvo Rimas Šuopys, la kompilinto de la libro



Gražina Opulskienė ricevas ekzempleron de NDK kiel premion

Povilas Jegorovas. Eblis aĉeti la libron kun granda rabato kaj ricevi aŭtografojn de la aŭtoro kaj tradukinto.

Halina Gorecka anoncis la nomon de ĉi-jara “Esperantisto de la Jaro” – ĉi tiun honoran titolon ricevis Anna Löwenstein el Britio.

Aleksander Korŝenkov kun la helpo de Halina Gorecka gvidis la kvizon “Zamenhof kaj lia tempo”. La premiojn gajnis Margarita Želve el Rigo kaj Gražina Opulskienė el Mažeikiai.

La tagon finis koncerto de Valdas Striužas kaj Jurgita Umaraitė. Sonis kantoj en Esperanto, itala kaj litova lingvoj.

Dimanĉe restintoj vizitis la tombon de la unua prezidanto de LEA Aleksandras Jakŝtas-Dambrauskas apud la katedralo de Kaŭno.

Dum la semajnfino eblis aliĝi al sekvont-jaraj Esperanto-kongresoj, aĉeti librojn en riĉa libroservo, pagi membrokotizojn de LEA kaj UEA k. s. Al BET-56 en Jelgava (Latvio) aliĝis 30 personoj, kelkaj personoj aliĝis al la 105a UK en Montrealo kaj al la 93a SAT-kongreso en Bjalistoko.

Povilas Jegorovas

Fotoj de **Gražvydas Jurgelevičius**

Zamenhoffesto 2019 en Berlino

Berlinaj kaj brandenburgiaj esperantistoj ankaŭ en la jaro 2019 invitis al Zamenhoffesto al la Oranĝerio – la civitana renkontiĝejo de la distrikto Lichtenberg en Berlino. Jam temas pri fiksa adreso de niaj aranĝoj.

Ĉi-foje ni celebris la 160an datrevenon de la naskiĝtago de Zamenhof kaj la Tagon de la Esperanto-libro la 14an de decembro.

Al la Zamenhoffesto venis ĉirkaŭ 60 personoj. Denove venis polaj geamikoj el Szczecin kaj Zielona Góra, sed ankaŭ el la regiono de Lublin kaj Silezio, el Moskvo – kaj eĉ el la fora Brazilo venis kvar homoj. La "eksteraj" gastoj estis petataj saluti la ĉeestantojn. Krome menciindas la ĉeesto de amikoj de la planlingvo Ido.

Okaze de la tradicia festprelego Ralf Fröhlich ricevis la bonŝancon prezenti sian unikan projekton en la iama stacidomo de la vilaĝo Halbe. Ĝia nomo estas "Esperanto-stacio". Tie jam okazis pluraj aranĝoj kaj kursoj, kaj laboremuoj povis renovigi la konstruaĵon, kiu cetere havas interesan najbaron, nome unu el la tielnomataj "Imperiistraj Stacidomoj". Ekzistas fruktedona kunlaboro, kiel mi mem spertis.

Ankaŭ okazis pluraj interesaj prezentaĵoj de en- kaj eksterlandaj amikoj. Parte proponoj venis lastmomente, kaj estis malfacila tasko doni tiujn al la programo, ĉar unuafoje nia aranĝo okazis nur inter la 15a kaj 19a horoj (minimume laŭ plano).

Fritz Wollenberg prezentis la ekspozicion pri la dekjarigo de la Zamenhofparko, kiu situas en la Berlina urbodistrikto Lichtenberg. Estis la lasta tago de tiu tre interesa ekspozicio en la konstruaĵo Oranĝerio. Pro tio Wollenberg invitis al gvidado.



Aleksandro Zdechlik, kiu ĝis majo 2019 estis la prezidanto de la Pola Esperanto-Asocio, prezentis impresoriĉajn bildojn kaj tekstojn pri la biografio de Zamenhof kaj krom tio pri germanoj kaj ties rilatoj al Bjalistoko.

Philipp Sonntag prezentis memfaritan poemon pri bestoprotektado en Esperanto kaj en la germana lingvo.

Ronald Schindler invitis al la pollanda-germana-fervoja Esperanto-Kongreso, kiu okazos dum Pentekosto 2020 kaj la sekvonta semajno en la “Duobla urbo” Frankfurto ĉe Odro kaj Słubice. La ĉeestantoj ricevis informojn pri la historio, kongresejoj kaj tranokteblecoj.

Ne mankis koncerteto. Ĉi-jare ni sukcesis inviti triopon, kiu konsistis el Birke Dockhorn, Bertilo Wennergren kaj – kiel surpriza gasto – Alena Adler el Usono. Tre altkvalite ili prezentis originajn kaj tradukitajn kantojn, parte el mondkonataj muzikteatraĵoj.

Niaj junaj brazilaj gastoj el Rio-de-Ĵaneiro kaptis la bonŝancon prezenti la Esperanto-movadon en Brazilo kaj invitis al diversaj interesaj aranĝoj en tiu grandega lando.

Halina el Szczecin instigis la partoprenantojn al kantado en Esperanto kaj en la pola lingvo. Por sia programero ŝi pertrajne kunportis tre pezan akordeonon.

Dum la tuta aranĝo okazis la jam tradicia kafumado, la unika libroservo de Johano Pachter kaj la jam menciita ekspozicio pri la Zamenhofparko.

Multan dankon al ĉiuj kunagintoj kaj helpintoj por ornami la salonon.

La sekvontan Zamenhoffeston ni jam fiksas en la sama salono por la 19a de decembro 2020. Do jam notu la daton por certigi vian partoprenon!

Ronald Schindler

Zamenhofa Matentagmanĝo en Berlino

Tradicie meze de decembro oni organizas Zamenhof-feston – en Berlino ekde dek jaroj aldone ekzistas la Zamenhofa Matentagmanĝo. La kaŭzo estas simpla: Preskaŭ ĉiam en la Zamenhof-festoj la programo estas tiel plenŝtopita, ke apenaŭ restas tempo por interparoli private. Sed homoj ja kunvenas ne nur por daŭre rigardi kaj aŭskulti ion sur la scenejo, ili volas ankaŭ flegi siajn privatajn kontaktojn, babili kun homoj, kiujn ili eble ne vidis dum tuta jaro aŭ pli longe. Ankaŭ ĉi-jare mi denove aŭdis plendojn post la Zamenhof-festo, ke ne restis tempo por babili.

Ĝi estas demonstra versio de la 76-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Tribuno



Aŭtune 2020 kadre de KAEST estos festata la 15-jariĝo de la internacia junulara krea grupo Edukado@Interreto, konata en Esperantujo kiel E@I, kiu, ĉefe per Esperanto, realigas edukajn projektojn kaj subtenas interkulturan lernadon kaj uzadon de lingvoj kaj retaj teknologioj. Legu pli pri la venont-jara agado de E@I sur la paĝoj 40-41 kaj venu al Slovakio por kunfesti (la supra foto estis farita en la dekjariĝa jubileo en 2015).

Niaj atingoj kaj malsukcesoj en 2019

Ankaŭ ĉi-jare *La Ondo de Esperanto* petis diverstendencajn aktivulojn respondi la tradician demandon: “Kiu(j) Esperanto-evento(j) en la jaro 2019, laŭ via opinio, estas la plej pozitiva(j) kaj la plej negativa(j)?”. Ni ricevis respondojn de dek personoj, kiujn ni dankas pro la kontribuoj al nia “Ronda Tablo”.

Peter Baláž (Slovakio)

E@I-kunordiganto

Atingoj:

- Okazigo de pluraj lingvaj festivaloj en la mondo pere de esperantistoj, kaj/aŭ partopreno de Esperanto-organizoj en prilingvaj aranĝoj.

- Okazigo de IJK en Slovakio.

- Daŭra partopreno de Esperanto-budo en la granda muzik-festivalo Pol'and'Rock.

- Ekesto kaj evoluo de la retejo www.eventaservo.org – moderna kalendaro de la Esperanto-aranĝoj.

Pri nia propra agado:

- Organizado de gravaj aranĝoj: la 13a Somera Esperanto-Studado en Nitro, Polyglot Gathering (Kunveno de plurlingvemuloj) en Bratislavo – la plej granda tiaspeca aranĝo tutmonde (654 homoj el 62 landoj); LingvaFest' en Bratislavo kun Eŭropa Komisiono kiel ĉefa partnero.

- Funkciigo kaj realigo de multaj interesaj projektoj: pluraj rekte por Esperanto, kelkaj per Esperanto, kiu estas la sola komuna laborlingvo en la oficejo de E@I.

- Libro de mia eldonejo *Espero*: la novelaro *Vundita vento* de Carlos Casares, kaj du infanlibroj de la slovaka verkistino Danuša Dragulová-Faktorová: *La aventuro de sinjoro Bruetulo* kaj *El la poŝtista sako*.

- Ĉiumonata kurso de Esperanto por infanoj 9-12-jaraj en la slovaka monata gazeto *Maxík* (22 mil ekz.) ekde septembro 2019 ĝis junio 2020.

Malsukcesoj de 2019:

- Daŭra malkresko de membroj sed ankaŭ de aktivuloj en diversaj Esperanto-organizoj internaciaj, naciaj kaj junularaj.

- Krizo en UEA, kiu daŭre serĉas sian vojon kaj ŝajne eĉ la celon por sia plua ekzisto.

- Forpaso de pluraj Esperanto- eminentuloj, inkluzive de la ikono de nia movado – Luis Zaleski-Zamenhof.



Anna Löwenstein (Britio)

Verkisto, redaktoro de uea.facila

Pozitiva afero en 2019 estas la konstanta alfluo de novaj lernantoj pro retaj kursoj kiel Duolingo kaj Lernu.net. Mi vidas tion propraokule, ĉar daŭre novaj homoj aperas ĉe niaj Esperanto-lecionoj en Londono. Kuraĝiga estas la fakto, ke multaj el ili estas junaj kaj tre entuziasmaj.

Sed dum aperadas novaj lernantoj, ili ne aliĝas al la tradiciaj asocioj, verŝajne eĉ ne scias pri ilia ekzisto. La plej negativa evoluo, bedaŭrinde, estas daŭra malkresko en la membronombro de UEA, kio ĉi-jare kondukis al financa krizo. Mi komencas timi, ke sen drastaj ŝanĝoj UEA ne travivos ankoraŭ multajn jarojn. Alveni al 111 jaroj estas impresa atingo, kaj malmultaj organizaĵoj daŭras tiel longe, sed UEA estas kiel maljuna praonklino, kiu mense vivas ankoraŭ en la antaŭa jarcento. Ĝi ne sukcesas adaptiĝi al la 21a jarcento. Kio okazos se ĝi entute malaperos? La Esperanto-movado sen UEA estos kolekto de disaj asocioj sen centro.



Renato Corsetti (Italio/Britio)

Eksprezidanto de UEA

Pozitivaj aferoj:

– La daŭra funkciado de la reta lernoprogramo Duolingo kaj la trovado de maniero ligi la lernantojn al la ekzistantaj lokaj kluboj.

– La progreso de Esperanto en pluraj aziaj landoj, eventuale ankaŭ Ĉinujo montras emon partopreni la ĝeneralan movadon.

– La daŭra ĉeesto de la Esperanto-movado ĉe UN kaj Unesko.

– La kresko de la konscio en UEA, ke ĝi estas ĉe la rando de malapero.

Malpozitivaj aferoj:

– La ĝenerala perdo de direkto en la Esperanto-movado. Se oni komencas perdi la esperon, ke Esperanto povos iĝi la internacia lingvo en la vera mondo, oni ne plu volas batali por io kaj okupiĝas pri sendanĝeraj ludoj.

– Kunlige kun tio mi vidas la disvastiĝon en UEA-rondoj de iu deziro malaperi (psikologiistoj parolas pri *cupio dissolvi*). Eble oni konscias, ke ĝi ne plu havas ion por proponi al la mondo, kaj do restas nur la obseda okupiĝo pri monda kongreso kaj ne pri la neesperantista mondo.



Iĝu abonanto de “La Ondo de Esperanto”!

Albert Stalin T. Garrido (Filipinoj) **Prezidanto de Filipina Esperanto-Junularo**

La jaro 2019 kiel la Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj estis grava oportuno por la Esperanto-movado kiel amiko de indiĝenaj kaj lingvaj rajtoj. Interalie notindas, ke Duolingo daŭre rolis kiel naskiĝejo de novaj esperantistoj, kiujn sekve paŝtis kompetentaj lingvofakuloj. Okazis la Azia Kongreso kaj la Afrika Kongreso, kiuj espereble antaŭenpuŝis kaj plikompetentigis regionajn movadojn ekstereŭropajn. TEJO ankaŭ lastatempe engaĝiĝis en novan, gravan fronton: universitata agado.



Ni funebras la forpason de Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof. Se temas pri la Esperanto-movado, mi preskaŭ ne plu bezonas diri, ke daŭras la financaj problemoj en UEA kaj la malkonstruado en la laborfortoj en la Centra Oficejo. Ankaŭ relative ne estis tro produktiva jaro por TEJO sur la tutmonda nivelo, kaj verŝajne IJK daŭre okazos en Eŭropo ĝis 2021 – do entute kvar sinsekvajn jarojn. Ĉiukaze, mi aŭdacus diri ke la nunaj estraroj de UEA kaj TEJO ŝajnas pli bonaj ol ties antaŭaj, sed ni ankoraŭ vidos, ĉu ili finfine kapablos turni la movadon en pozitivan direkton.

Dennis Keefe (Hispanio) **Iniciatoro de Universitato de Esperanto**

Rilate pozitivajn paŝojn en la virtuala mondo de Esperanto, menciindaj estas tri novaj, elstaraj retejoj: tiu por bazlernantaj legaĵoj (uea.facila.org), tiu por facile trovi eventojn en Esperantujo (eventaservo.org), kaj tiu por pli bone ordigi esperantajn filmetojn (tubaro.aperu.net).

Rilate la ĉeestadan flankon de la Movadoj, UEA, landaj kaj lokaj asocioj, la perspektivo ne estas sufiĉe alloga. Certe estas espero en la nova Estraro de UEA, sed la breĉo inter la malpliigintaj laborfortoj en la Centra Oficejo kaj la lastjaraj celoj de la Asocio estas granda.



Ĝi estas demonstra versio de la 76-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

E@I: Eventoj kaj agado por 2020

Okaze de la ĉi-lastata numero de *La Ondo de Esperanto* mi unue esprimas grandan admiron kaj dankon al la redakcio de ĉi tiu gazeto! Mi tre bedaŭras, ke ĝi ĉesas esti eldonata – ĝi longe estis tre bonkvalita, profesia kaj samtempe bunta novaĵejo, mapanta tutmondan agadon pri Esperanto. Ĝi certe mankos al ni ĉiuj. Samtempe mi deziras al ĝiaj ĉefmotoroj firman sanon kaj multajn poresperantajn aktivecojn!

Nun mi volus ĉefe paroli pri nia proksima estonteco, nome, pri agado de E@I dum la jaro 2020. Tiu jaro estos plena je edukaj eventoj sub nia gvido. Jen la listo laŭ kalendara ordo:

Eventoj:

Polyglot Gathering: La plej granda renkontiĝo de plurlingvemuloj tutmonde okazos ĉi-foje en Pollando, la 26-30an de majo en Teresin, apud Varsovio. Atendatas 600-700 partoprenantoj. Ĉirkaŭ 25% de ili parolas ankaŭ Esperanton! Pliaj detaloj: www.polyglotgathering.com (nur angle).


SES: La 14a Somera Esperanto-Studado estos historie la 1a en Ĉeĥio! En la pitoreska urbeto Kroměříž la 18-26an de julio oni lernos Esperanton, amuziĝos, ekskursos – simple ĝuos Esperantujon. Detaloj: <https://ses.ikso.net>.

SEP: Post ĉi-jara sukcesa premiero ĝi reokazos ankaŭ en 2020. SEP, aŭ plennome Somera Esperanto-Programado okazos samloke kaj samtempe kun SES, sed anstataŭ antaŭtagmeza lernado de Esperanto la partoprenantoj okupiĝos pri diversaj interretaj projektoj, retejoj, aplikaĵoj rilataj al Esperanto. Pli da informoj: <https://sep.ikso.net>.

LingvaFest: La unua kaj ununura lingva festivalo en Slovakio okazos la 28-29an de septembro en Bratislavo. La festivalo ĉi-jare allogis ĉ. 2500 personojn. Kursoj de diversaj lingvoj, prelegoj, metiejoj, koncertoj, ekspoziciantoj... Senpaga eniro! Detaloj: www.lingvafest.sk/eo.

KAEST: Konferenco pri aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko havas pli ol 40-jaran historion. Ĝi okazos oktobre en Slovakio (la loko kaj dato precizigotaj januare). Pli da detaloj jam baldaŭ ĉe: <https://kaest.ikso.net>.

Aŭtune ni ankaŭ festos la 15-jariĝon de E@I, oficiale fondita en 2005. Ĝuste dum KAEST 2020 okazos la festo kaj la superrigardo pri aktivaĵoj de la jubileanta organizo.



Somera Esperanto-Studado

Kroměříž (Ĉeĥio), 18-a ĝis 26-a de julio 2020

Venu sperti la mojosan someran Esperanto-lernejon! www.ses.ikso.net

Reta agado:

Ne nur pri la supraj aranĝoj ni zorgos en 2020. Kelkaj novaj edukaj retejoj naskiĝos, kelkaj projektoj ekrealiĝos aŭ estos daŭre prizorgataj. Jen, kiuj devus aperi:

Polski.info: ĉi tiu retejo instruos la polan lingvon al eksterlandanoj. Ĉu troviĝos ankaŭ Esperanta lingversio de ĝi? Espereble! Via helpo estas bonvena, se vi emus helpi pri la tradukado.

pocitacprekazdeho.sk: retejo de bazaj scioj pri komputiluzado – komence nur en la slovaka.

Antaŭnelonge ekfunkciis kelkaj novaj projektoj, kiujn indas mencii – eble iu emos utiligi ilin.

eduskills.plus: Dum eŭropaj klasĉambroj fariĝas pli kaj pli diversaj kaj kunigas studentojn kun variaj identecoj, instruistoj en Eŭropo ne ĉiam scipovas efektiviĝi taŭgan diversan aliron kaj malfacile sukcesas kontentigi la malsamajn bezonojn de individuoj. La celo de la projekto estas oferti al instruistoj edukajn strategiojn por kospomolita engaĝiĝo, diverseca edukado, filozofio kaj praktika uzado de tiuj principoj en klasĉambroj. La materialoj subtenas la akiron de kompetentoj bezonataj por aktiva partopreno en demokratio, kritika pensado kaj vivado en diversaj socioj, kaj temoj rilataj kun homaj rajtoj, klimata ŝanĝo, tutmondiĝo, justa komerco kaj konsumado.

kids.lingvo.info: Kuarki estas nova aplikaĵo por tabulkomputiloj. Kuarki – Traveller between wor(l)ds estas senpaga aplikaĵo por plurlingvaj infanoj pli ol 10-jaraj. Per ĝi la infanoj povas plivastigi sian vortoprovizon kaj ekzerci legadon kaj skribadon. La celo de la aplikaĵo estas kontribui al fermado de la ofte ekzistanta interspaco inter la lerneja kaj la hejma lingvoj, kaj provizi al la legantoj novajn kaj interesajn sciojn en interesa kaj amuza maniero. Infanoj, kiuj volas lerni fremdan lingvon kaj plibonigi siajn legkapablojn, ankaŭ povas esti helpataj de la aplikaĵo.

vortoj.net: Lernu vortojn ludante kaj moviĝante! Nova komputila ludo de E@I pri akurateco, lingvoj kaj amuziĝo. Kun la ludo “Vortoj” vi ekzercos fremdajn lingvojn kaj akiros konfidon pri ilia skribo. Samtempe vi bone amuziĝos kun viaj kolegoj kaj amikoj. Lingvoinstruistoj aprezos la eblon redakti la liston de vortoj, per kiu ili adaptos la ludon al siaj lernantoj. La ludo kombinas sanan konkuremon kaj amuziĝon, kaj vi samtempe povos moviĝi kaj testi vian memoron! Prepariĝas enreta versio, malfermita por aldoni ajnan lingvon kaj plilarĝigi la kategoriojn.

Ĝi estas demonstra versio de la 76-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Arkivo



«... unu el la mondaj aŭtoritatoj pri balistiko, membro de la franca Scienca Akademio, teknika direktoro de potenca ŝtalindustria firmao, pioniro de la elektrotekniko, li prezentis prestiĝan figuron de teoriisto kaj de realiganto. Ĉiam vigla malgraŭ la jaroj, ĉiam juna en siaj entuziasmoj, ĉiam fekunda en planado kaj projektado, li donkiĥote bataladis en la sciencaj medioj, por du tiam malŝatataj aferoj, kiujn li unuigis en sia arda deziro pri raciigo de la homa scio kaj perfektigo de la homa spirito: la Bibliografia Decimale Klasifiko kaj Esperanto, du necesegaj rimedoj disponigi al ĉiu esploranto la rezultojn de la scienca laborado». (G. Waringhien pri generalo H. Sebert)

Jubileoj kaj memordatoj en januaro 2020

1. Antaŭ 115 jaroj naskiĝis **Isaj Dratwer** (1905-1918-1985), juda bakteriologo k e-isto, loĝinta en Ruslando, Pollando k Israelo; fondinto (1933) k senŝanĝa prezidanto de Varsovia E-Societo ĝis la invado de Germanio (1939), ĝenerala sekretario de PEA (1947-58), komitatano de UEA (1948-51, 1956-58, 1961-67), prezidanto de ELI (1961-67); aŭtoro de kelkaj lerniloj k de libro pri Lidia Zamenhof (1980), kompilinto de la kolekto *Pri Internacia Lingvo dum jarcentoj* (1970). — Legu pli en NDK, p. 75-76.

3. Antaŭ 70 jaroj mortis **Ernest Archdeacon** (1863-1908-1950), irland-devena franca advokato, inventisto, mecenato, pioniro de aŭtomobilismo k aviado, populariganto de tekniko k e-isto; prezidanto de la landa asocio SFPE, poste UFE (1926-45), kunfondinto (kun G. Warnier, 1928) de la mecenata asocio "Domo de Eo", LKano (1932-38). — Legu pli en NDK, p. 15.

8. Antaŭ 85 jaroj mortis **Louis de Beaufront** (Louis Eugène Albert Chevreux 1855-1888-1935), franca instruisto, e-isto k idisto, nomita "la dua patro de Eo" pro la sukcesa disvastigo de Eo; fondinto (1898) de la asocio SPPE (poste: SFPE) k ties organo *L'Espérantiste*, reprezentanto de Zamenhof ĉe *Hachette* (1901-03), aŭtoro de pluraj lerniloj k prilingvaj libroj, inkluzive de la unua vera gramatiko de Eo *Commentaire sur la Grammaire de la Langue Internationale Esperanto* (1900); kompilinto de la antologio *Esperantaj prozaĵoj* (1902); en 1908 forlasis Eon k aliĝis al Ido, kiun li kunkreis. — Legu pli en NDK, p. 30-31.

12. Antaŭ 130 jaroj naskiĝis **Vasilij Jeroŝenko** (1890-1910-1952), rusa blinda instruisto k e-isto, konata en Eo kiel Eroŝenko; vojaĝinto per Eo tra kelkaj landoj en kiuj li instruis Eon, sekretario de Pekina E-Asocio k docento de Pekina E-Kolegio komence de la 1920aj jaroj; aŭtoro de pluraj verkoj en Eo, rusa, japana k ĉina lingvoj. — Legu pli en NDK, p. 84-86.

23. Antaŭ 90 jaroj mortis **Hippolyte Sebert** (1839-1898-1930), franca generalo, sciencisto k e-isto, la plej proksima kunlaboranto de Zamenhof; prezentinto de Eo en la Franca Akademio de Sciencoj (1901); la unua prezidanto de la Organiza Komitato (poste: KKK) fondita en la 1a UK (1905), fondinto k gvidanto de E-ista Centra Oficejo en Parizo, kunfondinto k la unua prezidanto de ISAE (1907), fondinto k redaktoro (kun G. Chavet) de *Oficiala Gazeto Esperantista* (1908-20), la unua prezidanto de Konstanta Reprezentantaro de Naciaj Societoj (1922-23). — Legu pli en NDK, p. 251-253.

29. Antaŭ 80 jaroj en la koncentrejo Palmiry estis murdita **Adam Zamenhof** (1888-1940), ruslanda, poste pollanda juda oftalmologo k e-isto, filo de Lazarj Markoviĉ "Ludoviko" Zamenhof.

30. Antaŭ 140 jaroj naskiĝis **Harold Bolingbroke Mudie** (1880-1902-1916), angla borsisto k e-isto, fondinto k redaktoro de *The Esperantist* (1903-05), vicprezidanto (1908-12) k prezidanto (1912-16) de BEA, unu el la tri ĉeforganizantoj de la 3a UK (Kembriĝo, 1907), kunfondinto de UEA (1908) k ĝia unua prezidanto ĝis sia morto. — Legu pli en NDK, p. 207-209.

Aleksander Korĵenkov

Kulturo



Ni sendas al István Nemere korajn gratulojn okaze de lia jubileo kaj deziras al li pliajn verkajn rekordojn, ankaŭ en Esperanto!

Nemere: Mi estas verkisto, tio estas unika metio



Antaŭ 75 jaroj, la 8an de novembro 1944 en Pécs naskiĝis István Nemere, kiu kun siaj 726 hungaraj libroj estas ne nur la plej fekunda aŭtoro en la historio de la hungara literaturo, sed ankaŭ la plej fekunda inter ĉiuj vivantaj aŭtoroj de la mondo. En ombro de ĉi tiu rekordo restas liaj 19 romanoj kaj tri novelaroj (re)verkitaj en Esperanto, sed ĉi tiu nombro sufiĉas, por ke li estu la plej fekunda Esperanto-prozverkisto. Pri la kvalito de liaj Esperantaj verkoj atestas tio, ke kvar el ili ricevis la premion “La Verko de la Jaro”. Malgraŭ sia giganta okupateco li afable konsentis respondi kelkajn niajn demandojn.

Kiel esperantistiĝas persono kiu poste riĉigas la Esperanto-kulturon per pli ol 20 libroj?

Havante 18 jarojn, en la lasta jaro de gimnazio, mi eksciis, ke Esperanto jam ne estas malpermesita kaj oni organizas kursojn. Mi anoncis min – tiel ĉio komenciĝis.

Vi estas sendube kaj senkonkurence la plej fekunda Esperanto-aŭtoro. Sed via ekster-Esperanta verkado estas eĉ pli miriga per grandeco: vi verkis aŭ tradukis pli ol 700 librojn en pluraj ĝenroj – romanoj, verkoj historiaj, sciencfikciaj, porinfanaj k. a. Kiel vi atingis tiun rezulton? Ĉu vi verkas de la mateno ĝis la nokto-nokto-fin’?

Ne, mi verkas ĉiutage – sabate, dimanĉe, naskiĝtage kaj eĉ la 1an de januaro – de la 5a matene ĝis posttagmezo. Kaj tiel dum pli ol 50 jaroj...

Ĉu verkado de libro en Esperanto iel diferencas de verkado en alia lingvo?

Kompreneble. Ne nur la lingvo estas alia, sed ankaŭ la legantaro. La averaĝa esperantista leganto estas pli pruda ol la nacilingvanoj. Interese, kiam oni tradukas iun mian Esperanto-libron en nacian lingvon, la reagoj estas tre malsamaj. En Ĉinujo, ekzemple, oni neniam tradukas miajn librojn pro iliaj – verdire tre mildaj – seksaj scenoj.

Se ne kalkuli la ĉi-jaran reeldonon de Jesa, via lasta Esperanto-romano aperis antaŭ dek jaroj. Ĉu vi rezignis pri la verkado en Esperanto?

Preskaŭ jes. Mi vane atendis, ke oni reagu al miaj lastaj tri romanoj. Nek la legantoj, nek la recenzistoj verkis, nur iomete... Do, ŝajnis al mi, ke jen, alvenis la

fino de mia Esperanta verkado. Tamen mi havas iun komencitan romanon, kiun mi volonte finverkus, sed ja mankas instigo.

La varieco de temoj en viaj romanoj estas tre granda, vi ne estas unutemulo. Sed neniam Esperanto aperas kiel ĉefa, aŭ eĉ nur fona, temo. Ĉu tio rezultas el via koscia decido?

Kompreneble. Min ne interesas la movado, eĉ ne ĝia pasinteco. Por mi la lingvo estas ilo, kiun mi provas uzi altnivele – mi ne ĉiam sukcesis – kaj por esprimi miajn ideojn, por iumaniere servi la legantojn, la homojn. Jen ĉio.

Komence de la 1990aj jaroj vi kunfondis kaj poste prezidis la Esperantan PEN-Centron. Bonvolu rakonti, kiel aperis la ideo, kaj kiel ĝi estis poste realigita. Pri kio okupiĝis kaj okupiĝas la verda sekcio de PEN?

Pri la lasta bonvolu demandi tiujn, kiuj vivigis tiun movadon de verkistoj. Mi hazarde fariĝis ano kaj poste prezidanto. Unu el la ĉefoj de la tiama internacia PEN estis konata hungara verkisto, György Konrád, kaj esperantistoj petis min: parolu kun Konrád, ke li helpu akcepti esperantistajn verkistojn. Tio sukcesis. Sed mi malŝatis esti prezidanto, same kiel mi malŝatis ĉiam esti ie ajn “ĉefo”, gvidanto, ordonanto. Mi estas verkisto, tio estas unika metio, kiun mi konas kaj en kiu mi bone aŭ malpli bone laboras.

Sed verkado ne estas via sola aktivado por Esperanto. Vi agadis ankaŭ en la kampo de denaskismo. Vi redaktis *Gepatran Bultenon* kaj fine de la 1970aj jaroj vi iniciatis Renkontiĝon de Esperantistaj Familioj, kiu daŭre okazas ĉiujare. Kiu estas la rolo de Esperanto en via familia vivo?

Nur mia unua edzino estis esperantistino, kaj nia filino fariĝis denaska esperantistino. Ŝia filino – do, mia nepino – same estas denaska. Ili vivis-vivas en Pollando, kaj se leteron mi skribas al iu el ili, tion mi plej volonte faras en “nia lingvo”, t. e. en Esperanto.

Kiu estas via plej ŝatata Esperanto-libro?

Tro malmulte mi legis el ili, ja tiom da laboro mi havas ĉirkaŭ miaj hungarlingvaj libroj. Hodiaŭ aperis mia 726a libro hungara (mi kalkulas nur la unuajn eldonojn). Ekde la 723a mi estas la rekordisto en la mondo, ĉar ankoraŭ neniu el la nun vivantaj aŭtoroj verkis tiom. Fakte, ekde kiam hungaroj ekzistas en tiu ĉi mondo, neniu skribis tiom da teksto en la hungara.

Kaj ĉu vi havas favoraton inter viaj propraj Esperanto-libroj?

Jes, pleje mi ŝatas *Dum vi estis kun ni kaj Terra*.

Intervjuis **Paweł Fischer-Kotowski**




Litova eldono de la biografia skizo pri Zamenhof

Ĉar en nacilingvaj enciklopedioj kutime estas nur unufraza mencio pri “pola lingvisto Ludwik (aŭ Ludwig) Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto”, ESF (Esperantic Studies Foundation) decidis eldoni modernan biografian skizon pri Zamenhof en kelkaj naciaj lingvoj.

Laŭ mendo de ESF ĝin verkis la Ruslanda ĵurnalistino Aleksander Korĵenkov surbaze de sia ampleksa verko *Homarano*, lanĉita en julio 2009 kadre de la 94a Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko (la dua, korektita kaj ampleksigita eldono aperis en 2011).

Aleksander Korĵenkov verkis sian skizon en Esperanto. En 2010 aperis ĝia angla versio, tradukita kaj adaptita de Ian Richmond, sekvis la slovaka, itala kaj portugala eldonoj.

La 14an de decembro 2019 kadre de la Zamenhof-Tagoj en Kaŭno (vd. p. 19) estis prezentita la litova versio. La litovan biografion, presitan du tagojn antaŭe, tradukis el Esperanto Rimas Šuopys. Krom la biografia skizo de Korĵenkov, en la libro estas bibliografio, kolekto de eldiroj de eminentuloj pri Esperanto, du artikoloj de Vytautas Šilas (pri la restado de Zamenhof en Veisiejai kaj pri la fondo kaj la unua



agad-periodo de Litova Esperanto-Asocio = LEA), artikolo de Povilas Jegorovas pri la centjara agado de LEA. La riĉe ilustritan 136-paĝan libron *Zamenhofas: biografinė apybraiža* eldonis Monda centro de litovoj en Kaŭno.

En la festa prezentado de la libro Aleksander Korĵenkov rakontis pri siaj zamenhofologiaj studoj kaj pri la evoluo de la projekto de ESF, Rimas Ŝuopys parolis pri sia traduklaboro, kaj la prezidanto de LEA Povilas Jegorovas pri la eldono de la libro.

36 ekzempleroj de la freŝeldonita libro estis aĉetitaj, kaj preskaŭ ĉiuj aĉetintoj profitis la eblon ricevi la aŭtografajn de la aŭtoro kaj de la tradukinto.

La litova estas la sepa lingva versio (inkluzive de la Esperanta originalo) de la biografia skizo *Zamenhof*.

Oni planas eldoni ĝin ankaŭ en la hispana lingvo. Interesatoj pri pliaj versioj skribu al Geoffrey Greatrex (geoffrey.greatrex@esperantic.org), kiu kunordigas la projekton en ESF.

Jam aperis:

Esperante: Korĵenkov, Aleksander. *Zamenhof: Biografia skizo* / Antaŭparolo de Halina Gorecka. – Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: LEA, 2010. – 64 p.; 600 ekz.

Angle: Korzhenkov, Aleksander. *Zamenhof: The Life, Works and Ideas of the Author of Esperanto* / Translation and notes Ian M. Richmond; Edited by Humphrey Tonkin. – New York: Mondial, 2010. – 114 p., il.

Slovaĵe: Korženkov, Alexander. *Život Zamenhova: Život, dielo a myšlienky autora esperanta* / Slovenský preklad z esperanta a angličtiny Pavol Petřík; Úvod Peter Baláž, Humphrey Tonkin. – Partizánske: Espero, 2011. – 104 p., il.; 500 ekz.

Itale: Korzhenkov, Aleksander. *La vita di Zamenhof* / Traduzione Cristina de Giorgio; Prefazione di Giorgio Novello. – Alghero: Edizioni Nemapress, 2017. – 140 p., il.

Portugale: Korĵenkov, Alexander. *Zamenhof: Vida, obra e ideias do autor do Esperanto* / Tradução e notas Fernando Pita. – Porto Velho: Temática Editora, 2018. – 196 p., il.


Ĉeĥe: Korženkov, Alexander. *Ludvík Lazar Zamenhof: život, dílo, ideály* / Překlad z esperantského originálu Jindřich Košťálek; Předmluva Humphrey Tonkin. – Dobřichovice: KAVA-PECH, 2019. – 132 p., il.

Litove: Korženkovas, Aleksandras. *Zamenhofas: biografinė apybraiža* / Iš esperanto kalbos vertė Rimas Ŝuopys; Straipsniai Povilo Jegorovo ir Vytauto Ŝilo. – Kaunas: Pasaulio lietuvių centras, 2019. – 136 p., il.; 300 egz.

Halina Gorecka

BLK: ree havebla, nemalhavebla

Baza Literatura Krestomatia / Komp., red. Vilmos Benczik, István Ertl, Aleksander Korĵenkov, Russ Williams; Antaŭpar. Aleksander Korĵenkov; Enkond. Vilmos Benczik; Biografioj: Vilmos Benczik, Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. — 4a eld., kompl. — Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2019. — 368 p.



Tridek tri jaroj pasis ekde la lasta eldono, fakte represo, de la fama *Baza Literatura Krestomatia* (BLK) de Vilmos Benczik. Ĝi estis kaj plu estas libro tre populara kaj la elekto de la redaktoro sendube influis la komprenon pri la literatura kanono en Esperanto. Por multaj BLK estis facile akirebla – pro la eldonkvanto kaj prezo – kaj pluraj konatiĝis kun la Esperanto-literaturo pere de ĝi. Iuj – kaj Aleksander Korĵenkov, kiu (kun)redaktis la novan eldonon, estas bona ekzemplo – post la gustumo pere de BLK decidis legi iujn el la verkoj en la tuto.

La unua eldono de BLK aperis en 1979, antaŭ precize 40 jaroj, ĉe Hungaria Esperanto-Asocio kiu tiutempe dank’ al la kompetenta Vilmos Benczik aktive kaj grandkvante eldonadis valorajn Esperanto-librojn. Ekzistis jam iuj antologioj kaj krestomatiaj, sed neniu estis tiel vasta, samtempe kompleksa kaj konciza, kiel BLK – kiu cetere ne estis planita kiel memstara fenomeno, sed kvazaŭ literatura aldonaĵo de *Gvidlibro por supera ekzameno*, alia elstara eldonaĵo de HEA.

Ambaŭ, la *Gvidlibro* kaj BLK, servis por kelkaj generacioj de esperantistoj, kiuj decidis pli profunde studi la lingvon, ĝian historion, movadon kaj literaturon. Ankaŭ la nunaj studentoj de la Interlingvistikaj Studoj en Poznano sin helpas per tiuj libroj, kaj mi faris same.

La tri unuaj eldonoj de BLK, kies eldonkvanto por Esperantujo estas pli ol impona – pli ol 8800 ekzempleroj – rapide elĉerpiĝis. La libro iĝis aĉetebla nur brokante kaj intertempe ankaŭ la literaturo pliriĉiĝis je pluraj verkoj kiujn oni ne povas neglekti. Tial la nova eldono estas bonvena.

Eble la esprimo “nova eldono” ne plene priskribas la libron. La dua eldono riĉigis BLK je du-tri tekstoj kaj la biografieta parto, la tria estis nura represo, sed ĉi tiu estas vaste ampleksigita de la tripersona skipo konsistanta el István Ertl, Aleksander Korĵenkov kaj Russ Williams. Kaj ĝuste ilia laboro igas la libron interesa eĉ por la jamaj posedantoj de la pli fruaj eldonoj. La Benczik-parto de la libro restis preskaŭ netuŝita (aldoniĝis nur romanfragmentoj de Piĉ kaj Urbanová kiuj antaŭe reprezentis nur per poemoj). Lia elekto de aŭtoroj kaj iliaj unuopaj verkoj jam fiksiĝis kiel –

minuskla – baza krestomatio. Verŝajne ne ĉiuj konsentos kun mi, sed mi kontentas ke oni ne provis reelpensi la radon – eĉ se ĝi eble estus pli ronda.

La nova parto, klare apartigita kaj baptita “Postrikolto”, rilatas nur al la periodo post la apero de la Benczik-a BLK kaj okupas ĉirkaŭ trionon de la volumo. Same kiel la antaŭulo, ĝi enhavas miksaĵon de prozo kaj poezio, sed male al ĝi – neniujn tradukojn. Interese, ĉu tio estis konscia decido de la kompilintoj aŭ simpla sekvo de la fakto ke la tradukoj nuntempe influas niajn lingvon kaj literaturon multe malpli ol en ĝiaj komencaj jaroj. La 20-paĝa parto kun biografietoj de la 82 aŭtoroj, reprezentitaj en BLK, estas lerte kaj fidinde ĝisdatigita. Tiuj informoj estas eta enciklopedieto, utila precipe por tiuj, kiuj komencas sian literaturan vojaĝon. Eĉ tiuj, kiuj jam posedas sian – verŝajne iom trivitan – ekzempleron de unu el la antaŭaj eldonoj, devus eksenti tenton al ĉi tiu libro.

Post la sukcesa *Nia Diligenta Kolegaro* la eldonejo *Sezonoj* havigis al nia movado plian referencverkon. La libro estas nemalhavebla por seriozaj studentoj de nia literaturo kaj rekomendinda por tiuj, kiuj komencas sian aventuron kun la verda literaturo, sed anstataŭ ricevi pretajn voĵŝildojn, ŝatus esplori kelkajn padojn por mem elekti sian pluan vojon.

Paweł Fischer-Kotowski

Mezkvalita omaĝo al elstara artisto

La Kompanoj. *Brel en Esperanto*: KD – [s. I.]: La Kompanoj, Duoble Unu, Vinilkosmo, 2018.



Oni ofte mencias kaj emfazas, ke Esperanto utilas kaj efikas kiel peranto de diverskulturaj valoroj, ke ĝi helpas konatiĝi kun alilingvaj kaj alikulturaj artaĵoj. Koncerne kantojn ni jam havas multajn bonajn ekzemplojn: diversnaciaj muzikaj grupoj tre digne kaj atentokapte prezentas al la tuta mondo la tradiciajn *popolajn* kantojn. Tamen la ekzemploj de Esperanto-prezentado de iuj pli-malpli modernaj artistoj malpli multas. De nun ni havas unu ekzemplon pli: temas pri la Esperanto-prezento de la mondfama fralingva kantisto Jacques Brel [Ĵak Brel].

Ĝi estas demonstra versio de la 76-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Bibliografio de Halina Gorecka (2)

Ni aperigas la duan parton de la bibliografio, komencita en novembro. Nun sekvas la listo de la verkoj de Halina Gorecka aperintaj en *La Ondo de Esperanto*. Ne estas registritaj la listoj de ricevitaj libroj kaj gazetoj, informoj pri konkursrezultoj en “Mozaiko”, etaj anoncoj, ripetaj publikigaĵoj (ekzemple, pri konkursoj), kompilaĵoj (ekzemple, ŝercoj el malnovaj gazetoj) kaj fotoj (kelkaj el ili aperis frontpaĝe).

1991

Esperanto en Sovetunio: 1989 // LO, 1991, №1.

Antaŭ 80 jaroj // LO, 1991, №1.

Omaĝe al Eroŝenko // LO, 1991, №1.

1992

Antaŭ 80 jaroj // LO, 1992, №1.

Mondcivitanoj // LO, 1992, №1. – [Pri la gazeto “Граждане мира”].

Antaŭ 80 jaroj // LO, 1992, №2.

Kremlaj historioj / Trad. el la rusa // LO, 1992, №2. – [Anekdotoj].

Antaŭ 80 jaroj // LO, 1992, №3.

Antaŭ 80 jaroj // LO, 1992, №4.

Antaŭ 80 jaroj // LO, 1992, №5-6.

1993

Esperanto en Ruslando: 1992 // LO, 1993, №1.

Antaŭ 80 jaroj // LO, 1993, №1.

Antaŭ 80 jaroj // LO, 1993, №2.

“En malbona vetero oni povas facile malvarmumi” // LO, 1993, №2. – [Medicinaj ŝercoj].

Antaŭ 80 jaroj // LO, 1993, №3-4.

Antaŭ 80 jaroj // LO, 1993, №5-6.

1994

Esperanto en Ruslando: jaro 1993 // LO, 1994, №1.

Antaŭ 80 jaroj // LO, 1994, №1.

Antaŭ 80 jaroj // LO, 1994, №2.

Antaŭ 80 jaroj // LO, 1994, №3-4.

Antaŭ 80 jaroj // LO, 1994, №5-6.

1995

Esperanto en Ruslando: jaro 1994 // LO, 1995, №1.

Antaŭ 80 jaroj // LO, 1995, №1.

Antaŭ 80 jaroj // LO, 1995, №2.
Stepanov estas ŝtelisto // LO, 1995, №2.
Antaŭ 80 jaroj // LO, 1995, №3-4.
Antaŭ 80 jaroj // LO, 1995, №5.
Antaŭ 80 jaroj // LO, 1995, №6.

1996

Esperanto en Ruslando: jaro 1995 // LO, 1996, №1.
Kaj la popolo elektis... // LO, 1996, №3. – [B. Jeljcin reelektita kiel la prezidento].

1997

Esperanto en Ruslando: jaro 1996 // LO, 1997, №1.
UEA nun kaj ĉiam // LO, 1997, №2. – [Recenzo: Jacob H. “Servisto de l’ ideo”].
Gorecka H., Korĵenkov A. Al la legantoj // LO, 1997, №4.
Gorecka H., Korĵenkov A. Al la legantoj // LO, 1997, №5.
La Vojo ĉiam plu pilgrimas // LO, 1997, №5. – [Prezentado de “La Mastro de l’ Ringoj” en Eŭropo-Azio’ 97].
Donacoj // LO, 1997, №5.
Du sinsekvaj aranĝoj en Pollando // LO, 1997, №6. – [Gdanska E-Kongreso, 23a Forumo de E-turismo kaj kulturo].
Rimarkinda evento // LO, 1997, №7. – [Recenzo: Thorsen P. “Babile kun mi mem”].
Novelo de Tolstoj en Esperanto // LO, 1997, №7. – [“La morto de Ivan Iljiĉ” aperis].

1998

Kien la landa asocio? // LO, 1998, №1. – [Esperanto en Ruslando post la disfalo de USSR].
UEA-subvencioj al bibliotekoj // LO, 1998, №2. – [Danko de KEB al la Biblioteka Apogo de Roma kaj Poul Thorsen].
“La Kunularo de l’ Ringo” denove havebla // LO, 1998, №2. – [Represo de la unua volumo de “La Mastro de l’ Ringoj”].
Donacoj // LO, 1998, №3.
Esperanto – simple // LO, 1998, №3. – [La rusa versio de la lernolibro de L. Fabretto].
Jubilea UER-20 en Niĵnij Tagil // LO, 1998, №5. – [UER-20].
Kontaktoj komplikitaj // LO, 1998, №5. – [Kontaktabloj de “La Ondo”].

Ĝi estas demonstra versio de la 76-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko



Ni kore dankas al István, kiu ekde 2003 propralege kaj helpe de siaj amikoj plukis kaj sendis al ni por publikigo 174 (cent sepdek kvar!) kolektojn de “Spritaj splitoj kaj preskeraroj” – unika projekto en Esperantujo! Ekde januaro legu liajn kolektojn en “Monato”. Kaj – ne faru erarojn. Memoru, ke István la Akr-okula senlace observas vin!

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Fideluloj kaj... prezidantoj

Krom niaj fidelaj esperantistoj <...> partoprenis la novaj prezidantoj de UEA kaj de TEJO... (Said Balouchi: La 51-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA kaj TEJO. // *Esperanto*, 2020, №1, p. 18)

Ambaŭ famaj e-istoj samloke

Ranier Clerici <...> laboris kiel <...> kolego de la alia konata esperantisto, Carlo Minnaja. (Nekrologo de Michela Lipari, *Esperanto*, 2019, №12, p. 261)

Rekorde longa renkonto

Mi reciproke invitas Vin al “Novojarsko-2020” en Barnaul (Rusio), kiu okazos la 31-an de aŭgusto 2019 – la 5-an de januaro 2020. (Vladimir Minin en yahoo-grupo esperanto-rus-informoj, 20 nov 2019; rimarkis Ibrahim Bryzgaloff)

Rimada rimedo

Diablo! – (ĝemas Dio sur fotelo) – / kia rimado perlabori panon... (Edwin de Kock: *La lingvo serena*, p. 488; legis Russ Williams)

Ĉu maratono aŭ galopo?

Kuro de Esperanto por telefonoj (Povilas Jegorovas, yahoo-grupo esperanto-lt, 19 dec 2018; trovis Ibrahim Bryzgaloff)

Urino universala

Pisporto al la tuta mondo. (Katalin Kovats, FB-grupo *Ekparolu!*, julio 2018; trovis Didje Bulonjano)

Kaj eble konvena fino por nia rubriko estas konfesi propran eraron. En la rubriko de novembro 2019 jena preskeraro “**Malcerta pozicio**. Mi tie longe staris sidiĝanta sur tabulo fiksita en la embruzo”, estis misatribuita al Edwin de Kock. Reale ĝi venas el *Memoraĵoj de entomologiisto (La KancerLiniko*, 2019, №169, p. 29), kaj ĝin trovis, same kiel aliajn tiunumere, ja venantajn el *La lingvo serena* de E. de Kock, Russ Williams.

Koran mankon al ĉiuj lekintoj de mia lubriko pro ilia atenco, kaj al *La Ondo de Esperanto*, kiu tiel longe bonvenenigis ĝin. Laŭplane ĝi plu paperados en la revuo *Monato* – se esperantistoj bonvolos plu eraradi.

István Ertl